

Heinrich Neye,

Kurta cirkvito kun sekvoj

tradukita de Manfredo Ratislavo

Du dratoj unu al alia
amiĝis, sen kontakto ia;
ĉar izolitaj pro prevent',
ke ne okazu akcident'.

La pluso-drato tre deziris
kaj ankaŭ la minus' sopiris,
amegon sentis jen la plus'
kaj same ankaŭ la minus'.

Envente ili eksusuris,
ŝancelis sin kaj ekmurmuris,
kontakton celis pro la am',
la amo brulis kiel flam'.

La izolaĵo jam loziĝis
en kelkaj lokoj kaj deiĝis.
Subite, kvazaŭ en moment'
kuniĝis ambaŭ por am-sent'.

Sekurigiloj trabruliĝis,
la tuta lando malheliĝis,
kaj tio de la travivaj'
teknika estis rezultaĵ'.

...

*Traduko de la Germana poemo “Kurzschluss mit Folgen” de HEINRICH NEYE (*1913-02-27 – †2002-07-18) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04).*

Arg-418-830 (2007-06-17 17:49:46)